

KIEL DIRI TRIMANIERE

(8-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:

Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14

Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.

Ankoraŭ en la sama interparolo pri la ideala urbo, Rita, kiel dekoraciistino kaj poetino, diris, ke vere necesegas multa pura oksigeno, sed ne nepre en la urba aero, sed ĉefe en la popola menso kolektiva.



Ankoraŭ babilante pri la perfekta urbo, Rita, ĉar ŝi faras dekoraciojn kaj poeziojn, asertis, ke en la vero multe pli necesas pureco en la urba menso de la kolektivaj individuoj ol en la aero.

Dum ili ankoraŭ konversaciis pri la ideala urbo, Rita, kiu ornamas domajn mediojn kaj verkas poemojn, deklaris, ke en vero estas tre bezona kampanjo pri malpoluado de la urba medio, sed komence de la soci-mensa medio.

Ŝia tezo estas, ke **urbo ne konsistas nur el materia urbanizita strukturo**, sed ankaŭ el harmonia kaj kolektiva penso.



Ŝia sinteno estas tio, ke **urbon formas ne nur la plenumado de urbaniza projekto**, sed ankaŭ la maniero kiel ties loĝantoj pense kondukas kolektive.

Ŝia vidmaniero estas tio, ke **urbo estas pli ol ties materia urbanize planita parto**, sed ĝi estas ankaŭ la etoso formita de la loĝantaro komuna konscienco.

Laŭ ŝia
opinio,
estas necesa,
antaŭ ĉio,
pureco de la
kolektiva
emocia
organismo,
per kultivado
de bedoj el
amo kaj per
starigo de
pontoj el
amikeco kaj
solidareco,
ne nur urb-
skale, sed
ankaŭ mond-
skale.



Por ŝi **unue**
necesas pura socia
emocia korpo, per
plantado de amo
kaj konstruado de
amikaj kaj solidaraj
ligiloj, ne nur lokaj,
sed tutmondaj.

Ŝi pensas, ke
komence
bezonatas
senmakula
socia emocia
strukturo, per
semado de
ĝardenoj el
amo kaj
konstruado
de pontoj por
interamikiĝo
kaj solidaraj
agadoj, ne nur
en la loka
urbo, sed
ankaŭ en la
tuta tergloba
civito.



Ŝia sinteno estas, ke la nutrado de la koro kaj de la menso per simplaj kaj spontaneaj pensoj lume reflektas sin en la socia vivo kiel tuto.

Ŝia penso estas tio, ke nutri la koron kaj la menson per netaj kaj liberaj ideoj, prilumas la socian vivon kiel tutan organismon.

Ŝia ideo estas, ke plenigi la koron kaj la menson nur per malkomplika kaj spontana idearo kontribuas por la lumeco de la tuta socio.


Ŝi kredas, ke
antaŭ ĉio,
por paca
kaj harmonia
kunvivado,
la baza socia
virto estas la
respekto de
unuj al la
rajtoj, moroj,
kredoj,
idiomoj kaj
vivstiloj de
la aliaj. Tio
estas la
unua
individua
devo.



Ŝi opinias, ke antaŭ
ol ĉio, por trankvila
kaj konkorda
komuna vivo, la
fundamenta
kolektiva morala
kvalito estas la
respekto pri alies
rajtoj, kulturoj,
religioj, lingvoj kaj
estmanieroj. Jen la
fundamenta unuopa
devo.

Ŝi konsideras,
ke unue, por
bonorda kaj
konsentema
reciproka
intervivado, la
esenca grupa
inklino estas
interindividua
respekto rilate
la rajtojn,
kondutojn,
fidojn,
lingvojn kaj
vivmanierojn.
Jen estas la
baza devo de
ĉiu.

Por ŝi, la vera lernejo ne estas ĝia konstruaĵo, sed estas instruado kun amo kaj sindediĉo fare de profesoroj indigitaj en sia profesio.



Ŝi asertas, ke la vera edukejo ne estas la materia parto de ĝi, sed estas edukado kun afablo kaj sindonado far instruistoj nobligitaj kiel profesiuloj.

Ŝia opinio, la lernejo en vero ne estas ĝia fizika strukturo, sed ĝi estas la ama kaj zorgema instrua agado flanke de instru-profesiuloj valorigitaj kiel tiaj.

Ŝi argumentas, ke la edukado de lernantoj ĝuste nutrataj kaj gvidataj, por plibonigi la moralon kaj la etikon de la loka kaj globa socioj, estas temo plej urĝe enklasiginda kiel lernobjekto.



Ŝi subtenas la ideon, ke la trejnado de studentoj bone nutrataj kaj instruataj, por pliperfektigi la moralon kaj etikon de ĉiuj socioj, estas urĝega disciplino por la lerneja programo.

Ŝi tezas, ke la instruado de lernoklaso konvene nutrata kaj edukata, por kvalitsaltigi la moralon kaj etikon de ĉiuj proksimaj kaj malproksimaj socioj, urĝas kiel lernobjekto enirinda en la lernejan programaron.



Krome, ŝi komprenas, ke la kuracistoj kaj flegistoj devas lerni kaj uzi la rimedojn de ĉiaj medicinoj, favore de la tuta bonfarto de la homoj.



Krom tio, laŭ ŝia kompreno, la san-profesiuloj devas kapabliĝi, por apliki la servojn de ĉiaspecaj kuracartoj, favore por la integra sano de la pacientoj.

Cetere, ŝiakomprenas, la medicinistoj kaj malsanulzorgistoj bezonas prepariĝi, por utiligi la terapiojn de ĉiuj kuracmetodoj, favore al la totala sano de la homaj estuloj.




Ŝi defendas la ideon pri havigo de **ter-kultura** sociala **daŭripova** kaj bone distribuata ekonomio, kiu ĉesigu la malsaton kaj la mizeron en la tuta mondo.

Ŝi predikas la ideon, ke necesas **agrikultura** socia **daŭrepova** kaj bone disigata ekonomio, kiu finu la malsaton kaj la malriĉegecon sur la tuta planedo.

Ŝi favoras al la ideo pri kreado de **agrokultura**, sociala, **kontrolate disvolviĝanta** kaj ĝuste (kaj juste) disdividata ekonomio, kiu metu finon al la malsato kaj al la ekstrema malriĉeco ĉie en la mondo.

Fine ŝi
pensas, ke **la**
ideala urbo
estas tiu, kies
socio agadas
aŭtonome por
la nepoluado
de la publikaj
kaj privataj
medioj, por la
feliĉo kaj
bonfarto de
ĉiuj, kaj de la
urbo mem,
kaj de la tuta
homaro,
kvazaŭ ĉelo
de monda
civito.



En la fino ŝi kredas,
ke **la socio** de la
perfekta urbo
agadas
proprainiciate por la
nepoluciado de ĉies
medioj kaj por la
feliĉeco kaj sano de
ĉiuj, jen de la urbo
mem, jen de ĉiuj
teranoj, kvazaŭ
tutmonda civito.

En la fino de la
fino ŝia opinio
estas, ke **la**
ideala urba
socio zorgas
memvole por
ne malpurigi la
individuajn kaj
kolektivajn
mediojn, krom
zorgi por la
ĝenerala
kontenteco
kaj bonfarto,
jen de la
urbanoj mem,
jen de ĉiuj
terloĝantoj,
kvazaŭ
kvartalo de
monda civito.

Organizis: Josenilton kaj Madragoa

